

LA SUNO HISPANA

ESPERANTISTA ORGANIZA KOMITATO

CIRKULERO DUA.

Organizaj dezidoj pri la funkciado de la provizoraj Komitatoj.

Laŭ la deziro de doktoro ZAMENHOF, ni konatigas al la Esperantistaro, la sekvan-tajn decidojn, akceptitajn konsente kun li, por faciligi kaj ordigi la preparadon de la laboroj de ambaŭ provizoraj komitatoj, fonditaj de la Kongreso de *Boulogne-sur-Mer*, (Organiza Komitato kaj Lingva Komitato) kaj por rapidigi, tra la Esperantis-taro, la sciigojn pri iliaj proponoj aŭ decidoj:

La laboro de ambaŭ komitatoj estos, en ĉiu okazo, preparitaj per la zorgoj de malgranda nombro da komitatanoj, speciale montritaj de D-ro ZAMENHOF, kaj sub la direkto de unu el ili, elektita kiel unua prezidanto aŭ eĉ kiel efektiva prezidanto kaj kondukanto.

Koncerne la Lingvan Komitaton, D-ro ZAMENHOF mem esploros, konsente kun Rektoro BOIRAC, la regulojn aranĝotajn por ĝia funkciado, kaj sciigos, kiel plej eble frue, la aprenitan de ili solvon.

Koncerne la Provizoran Organizan Komitaton, D-ro ZAMENHOF deziras, ke la ordinaraj laboroj, rezervante la principajn kaj gravajn decidojn, estu preparitaj nur per la oficiala prezidantaro elektita de la Kongreso de *Boulogne-sur-Mer* por formi la diritan komitaton, tiel estas: D-ro ZAMENHOF, prezidanto; S-oj BOIRAC, MICHAUX, MYBS, POLLEN kaj SEBERT, vicprezidantoj; kaj provizore, per la iniciato de tiu lasta vicprezidanto kiu akceptis kelkatempe tiun taskon.

Sekve, Rektoro BOIRAC kaj Generalo SEBERT povas, laŭ bezone kaj ĉiu siaflanke subskribi la cirkulerojn preparitajn je la nomo de la diritaj komitatoj.

Fine, ni sciigas ke, ankaŭ kun la konsento de D-ro ZAMENHOF, S-ro Gabriel CHAVET, eks-sekretario de la Esperantista Grupo Pariza, estas akceptita kiel Sekre-tario Agento, de la «Esperantista Centra Oficejo», sidanta en Parizo, kaj povos, kun tiu titolo, subskribi la leterojn devenantajn de tiu Oficejo.—Je la Nomo de la Orga-niza Komitato, *Sebert*.

CIRKULERO TRIA.

Detaloj pri la organizo de la Esperantista Centra Oficejo, en Parizo.

I.—Nia unua cirkulero, de la 25^a de Septembre 1905, konatigis ke «Esperantista Centre Oficejo» estas fondita en Parizo, kaj uzota de ambaŭ provizoraj komitatoj, elektitaj de la Kongreso de *Boulogne sur-Mer*, por efektiviĝi la funkciadon de la sekretarioj de tiuj komitatoj.

Sajnas al ni utile ke ni donu hodiaŭ, pri la vera signifo kaj la organizado de tiu Oficejo, kelkajn detalojn kiuj povas esti interesaj por ĉiuj esperantistoj.

La «Esperantista Centra Oficejo» estis fondata, kun la celo helpi la propagandon kaj diskonigon de Esperanto, starigante, por la esperantistoj de la tuta mondo, izolataj aŭ grupigitaj laŭ lokoj aŭ specialaj okupoj, la centron de rilatoj kaj informoj kies utilecon montris la Kongreso de *Boulogne-sur-Mer*.

Por trafi tiun celon, restante tute sendependa de ĉiu ajn grupo esperantista, la «Oficejo» projektas:

1.^e *Doni sciigojn* pri la demandoj kiuj rilatas la subtenadon kaj propagandon de Esperanto, al societoj, grupoj aŭ personoj kiuj sin interesas pri tio, kaj faciligi la rilatojn inter ili;

2.^e *Prepari la Studadon* de la demandoj kiuj povus esti enmetataj en la programon de la kongresoj, konferencoj aŭ aliaj kunvenoj, kiuj dezirus uzi la servon de la «Oficejo»; kaj helpi la komitatojn de tiuj kunvenoj, koncerne la kunvokojn kaj komunikojn;

3.^e *Helpi kaj partopreni*, se tio konvenas, la efektivigon de la decidoj de tiuj kongresoj, konferencoj aŭ kunvenoj;

4.^e *Klasigi kaj konservi la arkivojn* de tiuj kunvenoj, ĉiujn dokumentojn kiuj povas esti alkonfidataj al la «Oficejo», kaj ĉion kio povas interesi la Esperantistan Movadon:

5.^e *Organizi Bibliotekon* enhavantan ĉiujn verkojn en Esperanto kaj pri Esperanto, kolektante ankaŭ, laŭ la eblo, la artikolojn de gazetoj kaj revuoj, kaj verkojn rilatajn al dimandoj interesaj por Esperantismo;

6.^e *Kolekti ĉiujn sciigojn statistikajn kaj aliajn*, kiuj koncernas la diskonigon kaj la utiligon de Esperanto.

7.^e *Starigi kaj plenigi ĉiutage, bibliografion* de la verkoj en Esperanto kaj pri Esperanto.

II.—Por realigi tiun programon, la «Centra Oficejo» jam kolektis, 51, rue de Clichy, Paris, en sia legoĉambro:

1.^e *Bibliotekon* enhavantan la ĉefajn esperantistajn verkojn elirintajn de la komenco de nia afero, kaj tiujn kiuj koncernas la lingvon internacian;

2.^e *Kolekton da revuoj kaj gazetoj esperantistaj* kiuj nun eliras, kaj de la ĉefaj malnovaj gazetoj;

3.^e *Bibliografiajn katalogojn*, pri la esperantistaj verkoj (bibliotekaj verkoj kaj artikoloj de gazetoj kaj revuoj) ordigitajn laŭ la reguloj de la bibliografia decimala klasigo;

4.^e *Specialajn katalogojn*, ĉiutage plenigatajn, pri la diversaj sciigoj interesaj por la Esperantistoj;

Adresaron de la Esperantistaj Societoj kaj Grupoj;

Adresaron de la Esperantistoj kiuj havas rilatojn kun la «Oficejo»;

Adresaron de la komercistoj kiuj vendas librojn aŭ objektojn pri Esperanto;

Adresaron de la Esperantista gazetaro;

Adresaron de la ĉefaj esperantistaj kunvenoj, k. c.

III.—La «Centra Oficejo» estas malfermata ĉiujn tagojn (escepte dimanĉojn kaj festajn tagojn) de la 10.^a horo ĝis la 12.^a h. kaj de la 2.^a h. ĝis la 4.^a h., por ĉiuj esperantistoj loĝantaj aŭ transirantaj Parizon, kaj eĉ por ĉiuj personoj kiuj deziras informojn pri la lingvo internacia.

Ĉar ĝi deziras resti sendependa je ĉiu speciala grupo aŭ fondaĵo, kaj intencas, sekve, havi nenian intereson pri ia ajn komerca entreprenon, la «Centra Oficejo» ne devos esti uzata kiel pera rimedo, por aferoj kiuj povas okazi monajn riskojn aŭ respondecojn. Sekve, ĝi akceptos, nur kiel servo de propagando senpaga, la provizoran konservon de libroj, prospektoj aŭ aliaj objektoj disdonotaj. Se ĝi ricevos mendojn, aŭ monoferojn, por aĉeti librojn, abonojn, insignojn aŭ aliajn objektojn, ĝi nur transsendos ilin al la vendantoj aŭ komercistoj kiuj estos montrataj al ĝi por tio, aŭ, se ia montrado ne estas farata, al la komisiistoj kaj peristoj kiuj ŝajnos plej taŭgaj en ĉiu okazo; kaj ĝi ilin rilatigos kun la klientoj.

IV.—La «Esperantista Centra Oficejo» restis, ĝis nun, privata fondaĵo, organizita per la iniciato de kelkaj amikoj de Esperanto, kaj finance subtenata de ili; sed ĝiaj fondintoj intencas, por certe daŭrigi ĝian ekzistadon, fondi, se estas necese, specialan Societon de Amikoj aŭ Protektantoj de Esperanto, kiu sin okupas pri la direktado de tiu «Oficejo».

Atendante la momenton kiam ili povos sendi alvokon, por tio, al ĉiuj esperantistoj, la fondintoj de la «Oficejo» treege dezirus koni, de nun, la nomojn de tiuj kiuj, aprobantaj la programon supermontritan, volus helpi tiun entreprenon.

Ili kun granda dankemo, akceptus la aliĝojn sendatajn al ili, de ĉiuj personoj kiuj dezirus partopreni al la fondo de la kreota societo. Tiuj aliĝoj povas esti, de nun, sendataj al la Sekretario de la «Centra Oficejo».

Nova esperantisto

La sekvanta okazintaĵo, kiu antaŭ nelonge havis lokon en Valencio, estas tre kurioza kaj pruvas unu fojon pli la eksterordinaran facilecon de Esperanto.

Nia amiko S-ro Vicente Inglada dediĉis kaj donis la 20^{an} de Oktobro ekzempleron el siaj verkoj «Lernolibro kaj ekzercoj de la lingvo internacia Esperanto» kaj «Vortaro esperanta-hispana kaj hispana-esperanta» al Stabestro Generalo S-ro Ludoviko Moncada, en la deziro konigi al li la mirindan kreaĵon de doktoro Zamenhof, kiu jam estas scivolema afero por multaj personoj, kaŭze de la triumfo atingita dum la esperantista Kongreso de Boulogne-sur-Mer, okazinta en la Aŭgusto.

Un nuevo esperantista

El siguiente caso, ocurrido recientemente en Valencia, es muy curioso y prueba una vez más la extraordinaria facilidad del Esperanto.

Nuestro amigo D. Vicente Inglada dedicó y entregó el día 20 de Octubre un ejemplar de sus obras «Manual y ejercicios de la lengua internacional Esperanto» y «Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto» al general Jefe de Estado Mayor D. Luis Moncada, con el deseo de darle á conocer la creación admirable del Dr. Zamenhof, objeto de curiosidad ya de muchas personas por el triunfo alcanzado en el Congreso esperantista de Boulogne-sur-Mer, celebrado en Agosto último.

La sekvantan tagon 21^{an} de Oktobro, nia amiko estis surprizita pro letero, kiun servsoldato transdonis al li, redaktita jenmaniere:

«La 20^a de Oktobro de 1905.

Al la ilustrita kapitano S-ro Vicente Inglada.

Mia distinginda amiko: Mi dankas multe al vi la aldonitecajn frazojn, kiujn hodiaŭ vi al mi dediĉas en la ekzemplero el viaj verkoj, kies sola legado kuraĝigas por entrepreni kun kredo la studo de Esperanto, lingvo, kiu fariĝos tutmonda en mallonga tempo pro ĝia facileco je lerno.

Tiu ĉi letero estas mia unua leciono kaj al vi ĝin dediĉas via ekzamenota kaj tre aldonita amiko,

LUIS MONCADA.»

Sed tio ĉi ne estis ĉio. Malmultajn tagojn poste S-ro Generalo Moncada korekte tradukis esperante rakonton titolitan «La kvincenta ĉevaloj de la profeto», ĵus publikigitan de valencia ĵurnalo kaj la 2^{an} de Novembro, la nova eminenta esperantisto verkis rekte en Esperanto la rakonton nomitan «La plej malfeliĉa el ĉiuj», kiun ni havas hodiaŭ la plezuron prezenti al niaj legantoj.

Malmulte ni devas aldiri, por ke oni komprenu la grandan helpon, kiun tiu ĉi nova aliĝo liveras al nia afero kaj nur ni permesas al ni aldiri la atenton de niaj amikoj pri la nedubebla fakto, ke Esperanto povas esti lernata en malmultaj tagoj, kaj tio ĉi estu dirata sen ofendo al kelkaj personoj, kiuj obstinas malfermi la okulojn por ne vidi evidentajn kaj neigi la facilecon kaj nediskuteblan praktikecon de la lingvo internacia Esperanto.

El siguiente día, 21 de Octubre, nuestro amigo se vió sorprendido por una carta que le entregó un ordenanza y que estaba concebida en los siguientes términos:

Pero no fué esto sólo. Pocos días después el general Sr. Moncada traducía correctamente al Esperanto un cuento titulado «Los quinientos caballos del profeta», que publicaba un diario valenciano, y el día 2 de Noviembre, el nuevo eminente esperantista escribía directamente en Esperanto el cuento titulado «El más infortunado de todos», que hoy tenemos el gusto de presentar á nuestros lectores.

Poco hemos de añadir para que se comprenda el gran auxilio que esta nueva adhesión proporciona á nuestra causa, y sólo nos permitimos llamar la atención de nuestros amigos sobre el hecho indudable de que el Esperanto puede aprenderse en pocos días, dicho sea con perdón de algunas personas que se obstinan en cerrar los ojos á la evidencia y negar la facilidad y condiciones prácticas indiscutibles del idioma internacional Esperanto.

Bibliografio

Proverbaro esperanta, aldono al la verko «Fraseologio rusa-pola-franca-germana» de S-ro L. Zamenhof. Kajero 1. ĉe la aŭtoro, 34, strato Nowolipki, Varsovio. Prezo: 1 fr. 25; parto esperanta: 0 fr. 50.

Kiel la aŭtoro mem diras en la antaŭparolo, la proverboj enhavas en formo de mallongaj facile rememoreblaj frazoj

Bibliografía

Colección esperanta de proverbios, complemento de la obra «Fraseología ruso-polaco-franco-alemana», por F. Zamenhof. Cuaderno 1.º En casa del autor: 34, str. Nowolipki, Varsovia. Precio: 1'25 francos; parte esperanta, 0'50.

Como el autor mismo indica en el prólogo, los proverbios en forma de frases cortas que se recuerdan fácilmente,

grandan trezoron da popola saĝeco kaj ofte montras plej bone ideojn, kies disvolviĝo kaj plena klarigo postulus tre vastamplaksajn tekstojn. Tial la konado de proverboj estas necesega por la profunda ellerno de ia lingvo.

Sed la intereso multe plialtiĝas kiam la ekzamenon de la proverboj oni faras en kelkaj lingvoj per la kompara sistemo. Tiun ĉi objekton celas la publikigo de la kvarlinga «Frazeologio» de S-ro F. Zamenhof, kies du unuaj kajeroj estas jam eldonitaj kaj al kiuj la aŭtoro kredis konvene aldoni en aparta broŝuro la esperantan tradukon de la proverboj, kiuj en la «Frazeologio» aperas laŭ alfabeto.

Malgraŭ la modesteco de la aŭtoro, la esperanta teksto de la verko estas laŭmajstre farita kaj meritas pro sia graveco la helpon kaj bonakcepton de ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas je la perfekta konado de la lingvo internacia kaj tial ni ĝojas ĝin rekomendante plej ŝate al niaj legantoj.

Notions elementaires d' Esperanto, de Th. Cart. Du kajeroj: ĉiu 0'15 fr. Aĉeteblaj ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Tiu ĉi verketo estas elementa esperanta kurso, kiel ankaŭ prepara lerno de *Esperanto en dek lecionoj* el sama aŭtoro, verkita por personoj ne multe instruitaj pri gramatikaj demandoj kaj dezirantaj akiri praktikan kaj rapidan konadon de la lingvo internacia. La nova produktaĵo de S-ro Cart estas mirinde bone verkita kaj la publiko respondis tiel favore al la apero de *Notions elementaires d' Esperanto*, ke ĝia unua eldono, apenaŭ eldonita, estas jam proksima de tuta elvendiĝo.

Esperantaj Slosiloj, eldonitaj de sinjoro E. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Road Streatham Hill, Londono, S. W.

Per tiu ĉi titolo S-ro E. Ĉefeĉ, el Londono, publikigas 28 paĝajn broŝurojn, kiuj enhavas la plenan gramatikon

contienen gran tesoro de sabiduría popular y expresan frecuentemente, del mejor modo, ideas cuyo desarrollo y explicación completa exigirían textos de gran extensión. Por esto el conocimiento de los proverbios es indispensable para el estudio profundo de una lengua.

Pero el interés aumenta grandemente cuando el examen de los proverbios se hace en varios idiomas por el sistema comparado. A este objeto tiende la publicación de la «Fraseología» en cuatro lenguas del Sr. F. Zamenhof, cuyos dos primeros cuadernos han sido ya editados, y á los que el autor ha creído conveniente añadir la traducción en Esperanto y en folleto aparte de los proverbios que en la Fraseología figuran por orden alfabético.

A pesar de la modestia del autor, el texto esperanto de la obra está escrito de mano maestra y merece por su importancia el auxilio y buena aceptación de todos los esperantistas, á quienes interesa el perfecto conocimiento de la lengua internacional, y por esto mismo nos complacemos en recomendarlo con el mayor encarecimiento á nuestros lectores.

Notions élémentaires d' Esperanto, por Th. Cart. Dos cuadernos á 0'15 francos cada uno. De venta en la «Presa Esperantista Societo», 33, rue Lacépède, Paris.

Esta obrita es un curso elemental de Esperanto como introducción al estudio del *Esperanto en diez lecciones* del mismo autor, escrito para las personas poco versadas en los estudios gramaticales y que desean adquirir un conocimiento práctico y rápido del idioma internacional. La nueva producción del Sr. Cart está tan admirablemente escrita y el público ha respondido tan favorablemente á la aparición de las *Notions élémentaires d' Esperanto* que, apenas publicada la primera edición, está ya próxima á agotarse.

Claves de Esperanto, editadas por E. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Road, Streatham Hill, Londres. S. W.

Con este título publica el Sr. Ĉefeĉ, de Lóndres, unos folletos de 28 páginas que contienen la gramática completa de

de Esperanto kaj vortaron sufiĉe vastam-pleksan por traduki plej kutimaj tekstoj. Krom tio en la *Esperantaj Ŝlosiloj* enestas noticoj pri la nuna disvastiĝo de Esperanto, ver koj, gazetoj kaj societoj esperantistaj kaj kelkaj ekzercoj en la lingvo internacia; entute, la *Esperantaj Ŝlosiloj* estas veraj propagandaj lerniloj, kiuj, pro sia malmulta 5-grama pezo, ebligas sian kunsendon en leteroj, sen pligo de la franĉa kosto, kaj taŭgas bonege por rapide konvinkigi multajn personojn kaj ilin altiri al nia afero.

Ĝis nun, la *Esperantaj Ŝlosiloj* estas eldonitaj en angla, germana, itala kaj franca lingvoj, kaj oni nun preparas la eldonojn en sveda, hispana kaj rusa lingvo, kiuj tre baldaŭ aperos.

La prezo de ĉiu *Ŝlosilo* estas 5 centimoj; 10 ekzempleroj, 0'50 fr.; 50 ekz., 2 fr. kaj 100, 3'50; kaj oni povas ilin mendi rekte al la aŭtoro, kiu por la pago akceptas ĉiulandajn poŝtmarkojn laŭ efektiva valoro.

Al ĉiuj niaj legantoj ni rekomendas la *Esperantaju Ŝlosilojn*, kiuj pro sia malgranda prezo estas per si mem bonegaj propagandiloj kaj plene informas pri tio, kio estas Esperanto, enhavanta la necesajn elementojn por la tuja traduko de la tekstoj, verkitaĵ en la lingvo internacia.

Flugintaj Revoj por duono soprano aŭ baritono, poezio en Esperanto de A. Grabowski, muziko de Paŭlo Wachs. Prezo: 2 fr. Aĉetebla ĉe la aŭtoro strato Granda, 36, Saint Maudé (Seine), Francujo.

S-ro Wachs havis la ekstremon amindecon adresi al ni ekzempleron de tiu ĉi delikata valso, kiun ni rekomendas sincere pro beleco de la teksto kaj muziko, kiu sendube plaĉos al niaj legantoj. Ĉar ĝi estas esperanta kompozicio, ĝi meritas plej bonan akcepton kaj ni ne dubas ke ĉiuj amantoj de muziko rapidos akiri *Flugintaj Revoj*, en la certeco, ke ili pasigos tre agrablan tempo aŭdante ĝian ludon aŭ kanton.

Esperanto y un vocabulario bastante extenso para traducir los textos mas usuales. Además de esto, en las *Claves de Esperanto* se incluyen noticias relativas al desarrollo actual del Esperanto, obras, revistas y sociedades esperantistas y algunos ejercicios en la lengua internacional; en suma, las *Claves Esperanto* son verdaderos manuales de propaganda que por su poco peso, de 5 gramos, permiten el envío en cartas sin aumento del franqueo, y se prestan admirablemente para vencer rápidamente a muchas personas y atraerlas a nuestra causa.

Hasta ahora, las *Claves Esperanto* se han publicado en inglés, alemán, italiano y francés, y se están preparando las ediciones en sueco, español y ruso, que aparecerán muy en breve.

El importe de cada clave es de 5 céntimos; 10 ejemplares, 0'50; 50 ejemp., 2 francos, y 100, 3'50 fr.; y se pueden encargar directamente al autor, quien admite para el pago sellos de todos los países por su valor efectivo.

Recomendamos a todos nuestros lectores las *Claves Esperanto* que, por su poco precio, son un excelente elemento de propaganda, y por sí mismas informan de un modo completo lo que es el Esperanto y contienen los elementos necesarios para la inmediata traducción de los textos escritos en el idioma internacional.

Flugintaj Revoj para mezzo soprano ó baritono, poesía en Esperanto de A. Grabowski, música de Pablo Wachs. Precio: 2 fr. De venta en casa del autor, Grand rue, 36, Saint-Mandé (Seine), Francia.

El Sr. Wachs ha tenido la extrema amabilidad de remitirnos un ejemplar de este delicado vals que recomendamos sinceramente por la belleza del texto y de la música, que seguramente gustará a nuestros lectores. Por tratarse de una composición esperantista merece la mejor acogida, y no dudamos que todos cuantos gustan de la música se apresurarán a adquirir *Flugintaj Revoj*, en la seguridad de que pasarán un rato muy agradable oyéndole tocar ó cantar.

Sciigoj

S-ro Paul Tenneson nun el la plej malnovaj kaj fervoraj esperantistoj, mortis en Parizo.

Nian kondolencon al lia familio.

Amerikaj Unigitaj Ŝtatoj. — La gazararo de tiu lando sin okupas favore pri la esperanta Boulogne-a Kongreso kaj oni fondis grupon en New-York.

Anglujo. — Nia bonega franca kolego «Esperanto» enpresas en sia 11^a numero plenan raporton pri Esperanto en Anglujo, kiu montras grandan progreson de nia kara lingvo en tiu granda nacio.

Oni fondis grupojn en *Taunton*, *Bathgar* kaj *Herne-Bay*.

Belgujo. — La lasta numero de nia estimata kumbatalanto «La Belga Sonorilo» priparolas la progreson de Esperanto en ĝia lando. «Belga Ligo Esperantista» estas bonega ilo por tiu movado kaj tiel tion opinias nia senmorta doktoro kiam adresis leteron al tiu simpatia Ligo dirante al ĝia komitato: «Mi estas konvinkita, ke la fondo de la Ligo havos gravegan signifon por la progresado de nia afero en Belgujo».

Francujo. — Grupo esperantista fondiĝis en *Orleans*.

Nune oni faras en Parizo 46 kursojn en malsamaj lokoj.

Ni ricevis la unuan numeron de la tria jaro de «Espero Katolika». Vivu multe kaj bone, karega!

«Tra la Mondo». La numero 4^a laste ricevita (monato Septembro) estas tre interesa kaj ni ne povas rifuzi al ni la plezuron informi ion al niaj legantoj pri tiel grava revuo, kiu de tago al tago prezentigas en pli bonaj kondiĉoj por

Noticias

El Sr. Pablo Tenneson, uno de los más antiguos y fervorosos esperantistas, murió en París.

Nuestro pésame á su familia.

Estados Unidos de América. — La prensa de aquel país se ocupa favorablemente del Congreso esperantista de Boulogne y se ha fundado un grupo en Nueva-York.

Inglaterra. — Nuestro magnífico colega francés «Esperanto» inserta en su número 11 una completa referencia del Esperanto en Inglaterra, que demuestra gran progreso de nuestro querido idioma en aquella gran nación.

Se han fundado grupos en *Taunton*, *Bathgar* y *Herne-Bay*.

Bélgica. — El último número de nuestro estimado compañero de lucha, «La Belga Sonorilo», se refiere al progreso del Esperanto en su país. «Belga Ligo Esperantista» es magnífico instrumento para ese movimiento, y así lo estima nuestro inmortal doctor cuando dirige una carta á esa simpática Liga diciendo á su comité: «Estoy convencido de que la fundación de la Liga tendrá importantísima significación para el progreso de nuestro asunto en Bélgica».

Francia. — Se ha fundado un grupo esperantista en *Orleans*.

Actualmente se dan en París 46 cursos de Esperanto en distintos locales.

Hemos recibido el primer número del tercer año de «Espero Katolika». ¡Buena y larga vida, estimadísimo!

«Tra la Mondo». El número 4, últimamente recibido (mes de Septiembre), es interesantísimo y no podemos rehusar el placer de informar algo á nuestros lectores sobre tan importante revista, que de día en día se presenta en mejores

akiri la publikakcepton kaj favore konkuri kun la ne esperantaj revuoj ilustritaj, kiuj publikigas en la tuta mondo.

La n.º 4ª de «Tra la Mondo» enhavas bonegan artikolon pri la rus-japana militado verkita de S-ro Montrosier, kaj kie aperas multe de prijuĝoj kaj dokumentoj pri la Ekstremorienta malpaco, liveritaj de tie partoprenantaj militistaj esperantistoj rusaj kaj kelkaj engravuraĵoj aludantaj kuriozajn scenojn en la militadejo.

Ankaŭ la nomita n.º 4ª, empresas informojn pri la proksima esperantista Kongreso de 1906, kiu laŭ plej kredindaj opinioj, havos lokon en Svisujo; artikolon pri esperanta stenografio, kie oni reproduktas paĝon el la teksto de la kunsidoj de la Boulogne-sur-Mer-a Kongreso, ĉe kiuj funkciadis bonegsukcese kiel stenografisto Pastro Schneeberger, aŭtoro de esperanta sistemo stenografio; japanan rakonton esperantan tradukintan de doktoro Gambier, *La Rememorojn* (folietono), propagandan tekstaĵon, anoncojn, konkursajn problemojn, k. t. p.

Estas en preparado la kristnaska kaj novjara numeroj, kiuj promesas esti ĉefokazintaĵo, kaj se oni atentus ke «Tra la Mondo» per bonegaj gravuraĵoj kaj plena informado komunikas al ni ĉion gravan, kio okazas en la mondo kaj povas interesi la esperantistojn, oni tre bone komprenos, ke tiu revuo havas propra vivadon, per Esperanto kaj sukcese plenumas la celon, kiun nune oni altrudas al la ilustritaj gazetoj, kiel ni kuraĝas ŝate rekomendi al niaj legantoj la akiron de «Tra la Mondo», kies publikigo inaŭguracias novan epokon de prospero en la disvastiĝo de nia afero.

Germanujo.—Oni kreis grupojn en *Bale kaj Ulm*.

La Komercia Akademio de *Hamburgo* malfermis oficialajn kursojn de Esperanto.

condiciones para conquistar el favor del público y competir ventajosamente con las revistas ilustradas no esperantistas que en todo el mundo se publican.

El núm. 4 de «Tra la Mondo» contiene un excelente artículo relativo á la guerra ruso-japonesa, escrito por el señor Montrosier, y en que aparecen multitud de juicios y documentos de la guerra del Extremo Oriente facilitados por militares rusos esperantistas que en ella tomaron parte, y algunos grabados alusivos á escenas curiosas del teatro de operaciones.

Inserta también el núm. 4 referido, información sobre el próximo Congreso esperantista de 1906 que, á juzgar por las opiniones más autorizadas, tendrá lugar en Suiza; un artículo relativo á taquigrafía esperanta y en que se reproduce una página de texto de las sesiones del Congreso de Boulogne-sur-Mer, en las que actuó como taquígrafo, con excelente resultado, el P. Schneeberger, autor de un sistema de taquigrafía esperanta; un cuento japonés, traducido al Esperanto por el Dr. Gambier, *Los Recuerdos* (folletín), texto de propaganda, anuncios, problemas para los concursos, etc., etc.

En preparación está el número de Navidad y de año nuevo, que prometen ser un acontecimiento, y si se tiene en cuenta que «Tra la Mondo», por medio de excelentes grabados é información completa, nos comunica todo cuanto de importancia ocurre en el mundo y puede interesar á los esperantistas, se comprenderá muy bien que esta revista, por medio del Esperanto, tiene vida propia y cumple con éxito la misión que actualmente se impone á las revistas ilustradas, por lo cual nos atrevemos á recomendar encarecidamente á nuestros lectores la adquisición de «Tra la Mondo», cuya publicación inaugura una nueva época de prosperidad en la difusión de nuestra causa.

Alemania.—Se han creado grupos en *Bale y Ulm*.

La Academia de Comercio de *Hamburgo* ha abierto cursos oficiales de Esperanto.

Hungarujo.—Laŭ la bonega gazeto «Lingvo Internacia» multaj hungaraj gazetoj sin okupas favore pri Esperanto kaj oni formis komitaton por organizi potencan societeton esperantistan.

Rusujo.—La numero 3-4 de nia simpatia kolego «Ruslanda Esperantista», estas malgrandigita pro la gravaj kaŭzoj ke la cenzuro elstrekis artikolon de sinjoro A. Fablonovski «Rahelo kaj Lio», kaj pro la komuna striko de kompostistoj. Inter aliaj bonaj tekstoj ĝi enhavas la finon de interesa verko de D-ro Epštejn pri la batalado de Liao-Yang.

En *Ieniseisk* (Siberujo) oni kreis novan grupon.

Svisujo.—Oni fondis grupon en *Nyon* kaj alian en *Genevo* sub la titolo «La Stelo».

Hispanujo.—La *Madrid-a* ĵurnalo «La Correspondencia de España», enpresigas en Oktobra numero bonegan artikolon de nia malnova samideano kaj kara amiko S-ro Manuel Monteagudo priskribante per eleganta stilo kaj plena ĝusteco la Boulogne-an Kongreson.

S-ro Fernando Soler nova kaj jam lerta esperantista, entuziasma propagandisto de nia afero, publikigas en la Madrid-a revuo «El Electricista», bonegan artikolon pruvante la bezonon de ia internacia lingvo kaj prezentante esperantiston kiel la taŭga. Niajn gratulaĵojn kaj dankojn al la ilustrita kaj de ni tre estimata telegrafestro de *Engera-o*.

Novan kaj gravan esperantiston ni ekvidas. S-ro Luis Gil Sumbiela klopodis per la *Valencia* ĵurnalo «La Correspondencia de Valencia» tial ke la ĉi-tieaj distingindaj personoj okupus sin pri l' akcepto de lingvo internacia, kaj poste en sama ĵurnalo kaj en alia artikolo li insistas pri l' afero, raportas pri la Boulogne-a Kongreso kaj ŝajnas ekmontri simpatian pri nia lingvo. Ni gratulas nin, ĉar sinjoro Gil estas klerulo kaj certe kiam li elkons esperanton ni havos en li samideanon,

Hungria.—Según el magnífico periódico «Lingvo Internacia», muchos periódicos húngaros se ocupan favorablemente del Esperanto y se ha formado un comité para organizar una potente sociedad esperantista.

Rusia.—El número 3-4 de nuestro simpático colega «Ruslanda Esperantista», resulta disminuído por las importantes causas de que la censura tachó el artículo del Sr. A. Fablonovski «Rahelo kaj Lio», y por la huelga común de cajistas. Entre otros buenos textos contiene el fin de un interesante trabajo del Dr. Epštejn referente á la batalla de Liao-Yang.

En *Ieniseisk* (Siberia) se ha creado un nuevo grupo.

Suiza.—Se ha fundado un grupo en *Nyon* y otro en *Ginebra* con el título de «La Stelo».

España.—El diario de Madrid «La Correspondencia de España» inserta en un número de Octubre un magnífico artículo de nuestro antiguo colega y querido amigo D. Manuel Monteagudo, describiendo con elegante estilo y completa exactitud el Congreso de Boulogne.

D. Fernando Soler, nuevo y experto esperantista, entusiasta propagandista de nuestro asunto, publica en la revista de Madrid, «El Electricista», un magnífico artículo demostrando la necesidad de una lengua internacional y presentando el Esperanto como la apropiada. Nuestras felicitaciones y gracias al ilustrado y de nosotros muy estimado jefe de telegrafos de Enguera.

Un nuevo é importante esperantista vislumbramos. El Sr. D. Luis Gil Sumbiela procuró, mediante el diario de *Valencia* «La Correspondencia de Valencia», que las personas distinguidas de aquí se ocuparan de la aceptación de una lengua internacional; y después, en el mismo periódico y en otro artículo insiste en el asunto, se refiere al Congreso de Boulogne y parece empezar á mostrar simpatía por nuestro idioma. Nos felicitamos, porque el Sr. Gil es persona ilus-

kiu honoros nin. Venu al ni, decide, estiminda sinjoro!

En la ĉiutaga kurso malfermita de S-ro Codorniu en la *Murcia* Casino ĉeestas magistratoj, juĝistoj, notarioj, advokatoj, inĝenieroj, bienuloj, kaj t. p. Oni povas diri ke tiu urbo estas jam elesperantigita. La gazeto «La Verdad» presigis artikolon de S-ro Grima kaj alian de S-ro Codorniu, titolita «Nia celo» kiu estis favore akceptita de la publika opinio. S-ro Benavente ankaŭ presigis belajn artikolojn en la semajna revuo «Murcia».

S-ro Manuel Esteban presigis bonajn artikolojn pri nia afero en «El Castellano» de Burgos, kaj tie oni klopodas por ke la komerca kamero malfermu kurson por la lernado de Esperanto.

Ankaŭ en la grava urbo *Bilbao* estas granda la movado. S-ro Prados kun aliaj samideanoj ellernas Esperanton por poste malfermi novajn kursojn, kiujn la publika opinio varme deziras. «El Noticiero Bilbaino» kaj «El Nervión», multe helpas nian entreprenon.

Nia senlaca propagandanto S-ro Monteagudo kreis gravan grupon en *Koruĵjo* kaj presigis bonajn artikolojn en la tieaj ĵurnaloj «La Voz de Galicia» kaj «El Noroeste», kaj en la revuoj «Coruña Moderna» kaj «Revista Médico Social». Ankaŭ malfermis kurson en la multnombra societo titolita «Círculo de Artesanos».

En la *Mahon-a* Ateneo, S-ro Pastro J. Juaneda faris notindan paroladon kaj nun malfermis tie kurson de Esperanto. La ĵurnalo «El Bien Público» raportas ĝin.

Engero. En tiu ĉi urbeto Esperanto progresas rapidege. Sekve de la propagando de nia nelacebla samideano sinjoro Ferdinando Soler Valls, la urbeŝtaro de Engero interkonsentis unuanime aliĝi al nia afero, kiel tion pruvas la sekvantan akton, kiun en publika kunsido de la 6.^a

trada, y seguramente cuando conozca á fondo el Esperanto, tendremos en él un *samideano* que nos honrará. Venga usted hacia nosotros, decididamente, estimable señor!

Al curso diario que ha abierto el señor Codorniu en el Casino de *Murcia* asisten magistrados, jueces, notarios, abogados, ingenieros, propietarios, etc. Se puede decir que aquella ciudad está ya esperantizada. El periódico «La Verdad» insertó un artículo del Sr. Grima y otro del Sr. Codorniu titulado «Nuestro propósito», que fué favorablemente aceptado por la opinión pública. El Sr. Benavente también ha publicado buenos artículos en la revista semanal «Murcia».

El Sr. Manuel Esteban también ha publicado buenos artículos referentes á nuestro asunto en «El Castellano», de *Burgos*, y allí se procura que la Cámara de Comercio abra un curso para el estudio del Esperanto.

También en la importante población de *Bilbao* es grande el movimiento. El Sr. Prados, con otros colegas, aprenden el Esperanto para después abrir nuevos cursos, lo cual ardientemente desea la opinión pública. El «Noticiero Bilbaino» y «El Nervión» ayudan mucho á nuestra empresa.

Nuestro incansable propagandista señor Monteagudo ha creado un importante grupo en *Coruña* y ha hecho imprimir buenos artículos en los periódicos de allí «La Voz de Galicia» y «El Noroeste», y en las revistas «Coruña Moderna» y «Revista Médico-Social». También abrió un curso en la numerosa Sociedad titulada «Círculo de Artesanos».

En el Ateneo de *Mahón*, el sacerdote Sr. J. Juaneda ha hecho un notable discurso, y ahora ha abierto allí un curso de Esperanto. El diario «El Bien Público» se refiere á ello.

Enguera. En esta población el Esperanto progresa rápidamente. A consecuencia de la propaganda de nuestro infatigable compañero de ideas D. Ferdinando Soler Valls, el Ayuntamiento de Enguera acordó unánimemente adherirse á nuestra causa, como lo prueba el texto

de Novembro oni decidis adresi al la elpensinto de Esperanto.

«Al eminenta Doktoro de Medicino S-ro L. Zamenhof, elpensinto de la lingvo Esperanto, Varsovio (Rusujo).

Distinginda doktoro: Ĉar la Urbestraro Moŝto, kiun mi havas la honoron prezidi, eksciis ke en tiu ĉi urbeto organiziĝis Societo nomata «Engera Grupo Esperantista», kies celo estas nur propagandi la belan idiomon internacian elpensintan de vi; montritaj de la Urbestraro S-ro Josefo Ibáñez Fabra, ĉe la la lasta okazinta kunsido, la sendubaj bonfaroj, kiujn alportus al la homaro tiel mirindega lingvo; kaj preta tiu ĉi Urbestraro apogi ĉion, kio signifas progresadon kaj klerecon, ĝi decidis, ĉe la hodiaŭa kunsido, varmege gratuli vin pro tio, ke vi elpensis tiel facilan kiel agrablan kaj utilan idiomon, kaj samtempe sciigi vin, ke tiu ĉi Urbregistro faros tion, kio al ĝi estos eble, por monhelpi la supre diritan Grupon esperantistan, antaŭnelonge kreitan en tiu ĉi urbeto, por disvastigi, kiel ĝi meritas, aferon tiel gravan, kaj por kunhelpi per nia modesta obolo al tio, ke la Zamenhofa lingvo estu baldaŭ proklamata kiel oficiala lingvo inter la civilizataj nacioj.

Kion mi havas la plezuron sciigi vin, kiel Prezidanto de tiu ĉi Urbestraro Moŝto, por via plej granda kontenteco.

Engero, Valencio (Hispanujo), la 6.^{an} de Novembro 1905.—La Urbestro (subskribita).»

Al tiu ĉi skribaĵo D-ro Zamenhof respondis la 15.^{an} de Novembro per la jena letero:

«Varsovio 15-11-05.

Al la estimata Urbestraro en Engero mi sendas la plej koran dankon por la amika letero de 6^a de Novembro kaj por la nobla helpo, kiun la Urbestraro decidis donadi al la afero Esperanta kaj al la Engera Grupo Esperantista.

Kun plena estimio

L. ZAMENHOF.»

de la siguiente acta que en sesión pública del 6 de Noviembre decidióse dirigir al inventor del Esperanto:

Al eminente doctor en Medicina señor D. L. Zamenhof, inventor de la lengua Esperanto, Varsovia (Rusia).

Distinguido doctor: Sabedor el Muy Ilustre Ayuntamiento, que tengo el honor de presidir, de que en esta villa se estaba organizando una Sociedad denominada «Grupo Esperantista de Enguera», cuyos fines son propagar el hermoso idioma internacional que ha inventado usted; indicados por el concejal de este Ayuntamiento, D José Ibáñez Fabra, en la última sesión celebrada, los inconcusos beneficios que á la humanidad reportaría tan admirable lengua, y dispuesto este Ayuntamiento á apoyar todo cuanto signifique progreso é ilustración, acordó, en sesión celebrada el día de hoy, felicitar á usted calurosamente por haber inventado tan fácil cuanto agradable y útil idioma, al propio tiempo que manifestarle que este Municipio hará cuanto le sea posible para subvencionar al mencionado Grupo Esperantista, recientemente organizado en esta población, para propagar, cual merece, asunto tan trascendente, contribuyendo con nuestro modesto óbolo á que la Zamenhofa lengua sea en breve declarada oficialmente, por las naciones civilizadas, lengua internacional auxiliar.

Lo que, como representante de este Muy Ilustre Ayuntamiento, tengo el gusto de participar á usted, para su mayor satisfacción.

Enguera, Valencia (España), 6 de Noviembre de 1905.—El Alcalde, *Francisco Pérez Talón.*»

A este escrito contestó el Dr. Zamenhof en 15 de Noviembre con la siguiente carta:

«Varsovia 15-11-05.

Al estimable Ayuntamiento de Enguera envió mis más cordiales gracias por la amistosa carta de 6 de Noviembre y por la noble ayuda que decidió dar á la causa esperanta y al Grupo Esperantista de Enguera.

Con plena estimación,

L. ZAMENHOF.»

Sed tio ĉi ne estas ĉio. Kaŭze de la granda entuziasmo tie reĝanta, Grupo esperantista komencos funkciadi de la 1^a de proksima Januaro kaj kies estraro estos la jena:

Prezidanto kaj bibliotekisto, sinjoro Ferdinando Soler Valls; vicprezidanto, S-ro Julio Morató Gil, kuracisto; sekretario, S-ro Emanuelo Jordá García, publika instruisto; vicsekretario, S-ro Prospero Ibáñez González, drapa fabrikisto; kasisto, S-ro Johano Josefo Lloná Viguier, urbestreja sekretario; voĉdonantoj, sinjoroj Teodosio Cabezas Simón, Josefo Ibáñez Fabra, fabrikistoj.

Ni prezentas plenan gratulon al la Enguera urbestro por ĝia brila iniciativo kaj al nia kara amiko S-ro Soler Valls, la animo de la esperantista movado propaganda.

Pero no es esto todo. A causa del gran entusiasmo que reina allí, un Grupo esperantista empezará á funcionar desde 1.º de Enero próximo y cuya Junta Directiva será la siguiente:

Presidente y bibliotecario, D. Fernando Soler Valls, jefe de telégrafos; vicepresidente, D. Julio Morató Gil, médico; secretario, D. Manuel Jordá García, profesor de Instrucción pública; vicesecretario, D. Próspero Ibáñez González, fabricante de paños; tesorero, D. Juan José Llorca Viguier, secretario del Ayuntamiento; vocales, D. Teodosio Cabezas Simón y D. José Ibáñez Fabra, fabricantes.

Damos nuestra cumplida enhorabuena al Ayuntamiento de Enguera por su brillante iniciativa y á nuestro querido señor Soler Valls, el alma del movimiento de propaganda esperantista.



La plej malfeliĉa el ĉiuj

En unu el la urboj pli multe homplenaj de la reĝlando Popolaro, loĝis fama riĉegulo, al kiu neniam io mankis kaj kiu jam nenion deziris, ĉar per siaj multkvantaj riĉaĵoj, li konsumis ĉiujn siajn kapricojn kaj ĝuis ĉiujn plezurojn. Tial nenio amuzis kaj ĝojigis lin.

En unu tago, li havis la humoraĵon kunvoki en sian palacon ĉiujn malriĉulojn el la urbo por doni tuj al ili, kiom ili petus al li. Ĉiuj alkuris ĝustatempe en la kunvenon, kaj unu post unu prezentis al li siajn dezirojn.

Modestaj en petado, unuj kontentiĝis per nova vestaĵo por anstataŭi la ĉifonaĵojn per kiuj ili kovriĝis; aliaj nur volis, ke oni pagu al iliaj luigantoj la monatojn

El más infortunado de todos

En una de las ciudades más populosas del reino de Popolaro vivía un célebre millonario, quien nunca había carecido de nada y que nada absolutamente deseaba, porque con sus cuantiosas riquezas había ya agotado todos sus caprichos y gozado de todos los placeres, y por esta causa nada le distraía y regocijaba.

Un día tuvo la humorada de citar en su palacio á todos los pobres de la ciudad para darles en seguida cuanto le pidiesen. Con gran exactitud acudieron todos á la cita, y uno por uno le expusieron sus deseos.

Parcos en pedir, unos se contentaron con un nuevo traje para substituir con él los andrajos con que se cubrían; otros solamente deseaban que se pagase á sus

malakuratajn de luo por ne resti sen hejmo; kelkaj petis malgrandajn kvantojn por sin dediĉi je unu negrava industrio aŭ komerco; la plimultaj, taglaboristoj sen laboro, petis, ke oni donu al ili konstante laboron por gajni honeste ilian vivadon; la pli malmultaj volis modestan dometon; multaj petis almozon sufiĉan por helpi tuj sian grandan mizeron kaj tiun de siaj edzinoj kaj gefiloj; kaj same la restantaj volis, ke oni donu al ili, kion ili kredis plej necesa kaj urĝanta por malpezigi ilian malfeliĉan ekziston.

Ĉiuj estis tuj komplezataj, kaj ĉiuj benante tiun sinjoron, tiel grandaniman, kompateman kaj donaceman, eliris el la palaco de la grandsinjoro, plenaj de kontenteco kaj gajeco pro la profito ricevita, feliĉo kiun oni elvidis en iliaj animataj vizaĝoj malgrasaj; kio kaŭzis grandegan miron al la riĉegulo.

Sola jam en sia malavara loĝejo, li restis pensanta, malgaja, kaj meditanta tre profunde pri tio, kion li vidis, kio ne sukcesis eltiri lin el lia konstanta tediĝo, kaj li ekkriis kun maldolĉeco, ĉagreno kaj plena konvinko: «Mi estas la plej malfeliĉa el ĉiuj».

Kaj por povi iam senti, iom da kontenteco, li disdonis ĉiujn siajn bienojn por bonfaroj, rifuĝejoj, malsanulejoj, lernejoj, domoj por taglaboristoj, k. c., kaj li iris kunmiksiĝi kun la malriĉuloj de la urbo.

LUDOVIKO MONCADA.

Valencio, la 2^{an} de Novembro de 1905.

caseros los meses atrasados de alquiler para no quedarse sin hogar; algunos pidieron pequeñas cantidades para dedicarse á una modesta industria ó comercio; la mayor parte, obreros sin trabajo, solicitaron que se les ocupara constantemente para ganarse honradamente su vida; los menos solicitaron una modesta casita; muchos rogaron se les diese una limosna suficiente para remediar su gran miseria y la de sus esposas é hijos, y del mismo modo los restantes quisieron que se les diese lo más necesario y urgente para aliviar su desgraciada existencia.

Inmediatamente fueron todos complacidos, y todos, bendiciendo á aquel señor tan magnánimo, compasivo y dádivo, salieron del palacio del magnate llenos de contento y alegría por la merced recibida, felicidad que se translucía en sus animados pero enjutos semblantes; lo que causó una muy grande admiración al millonario.

Solo ya en su espléndida morada, quedó pensativo, triste y meditando profundamente sobre lo que había visto, sin haber conseguido disipar su constante aburrimiento, y exclamó con amargura, pena y completamente convencido: «Yo soy el más infortunado de todos».

Y para poder experimentar algún día un poco de alegría, distribuyó todos sus bienes en obras benéficas, asilos, hospitales, escuelas, casas para obreros, etc., y fué á confundirse con los pobres de la ciudad.

LUIS MONCADA.

Valencia 2 Noviembre 1905.

SINDONO

Al nia karega amiko kapitano Vicente Inglada.

Abeló, rakontu do, kiun regolo
Pepadas, flirtante tra l' brua arbaro.
—Ĝi diras, sidante sur griza tremolo:
«Mi kantus plezure por tuta l' homaro!»

Kaj kion parolis la spiko el oro
En vasta grenkampo simila je maro?
—Ĝi diris: «Mi preĝas por mia honoro,
Ke mi maturiĝu por tuta l' homaro!»

Aŭskultu la brilan siringon en bedo:
Eligás murmuro el la foliaro.
—Ĝi diras: Ĉe tie mi velkas pro tede,
Mi florus plezure por tuta l' homaro!»

Pri kio riproĉis vinbero virinon
Iam pretan ĝin kapti por la vinpreparo?
—Ĝi diris: «Ĉar sango liveras la vinon
Mi mortus plezure por tuta l' homaro!»

VICTOR NADAL.

Tradukis: D-ro G. Philippet.

OFRECIMIENTO

Cuenta, pues, joh abeja!, que pía el reyezuelo
Cruzando con su vuelo la ruidosa selva.
Él dice, reposado en gris álamo blanco:
—Con gusto yo cantara á la humanidad entera

Y ¿qué es lo que decía la espiga hecha de oro,
De trigo en vasto campo que se parece al mar?
—Dios quiera—ella decía—que por el honor mío
Yo me sazone y nutra la plena humanidad.

Escucha allá en el campo la esplendorosa lila,
Despréndese un murmullo del grupo de las
(hojas,
Que de este modo dice:—Aburreme aquí el tedio
Con gusto floreciera por la humanidad toda.

Y ¿qué es lo que echa en cara el racimo á las
(mujeres
Dispuestas ya á cogerlo iniciando la vendimia?
—Puesto que—les decía—el vino da mi sangre
La raza humana entera es dueña de mi vida.

Hispanigis A. G., Sk.

Grava avizo

La jaro finiĝas kaj ni ankoraŭ ne ricevis la koston de kelkaj abonoj de tiu ĉi kaj eĉ de la laste pasinta jaro. Tial de nun ni ne povos akcepti abonojn sen antaŭdona pago kaj ni plej humile petas al ĉiuj abonantoj kaj perantoj kiuj al ni ŝuldas, la saldon de iliaj ŝuldoj, kaj ni rememorigas al ili, kiel al ĉiuj, kiuj de nun devos fari al ni ian pagon, pri la facileco kiun ni donadas per la akcepto de poŝtmarkoj el kiu ajn lando.

Al la hispanaj esperantistoj, kiuj, ne estante abonintoj de nia gazeto, ŝatas ĝian daŭrigon, ni petegas, ke ili helpu per sia abono, kiel la plej bona rimedo por trafi sian kaj nian deziron, por ke la grandega ŝarĝo kiun ni sen privata profito akceptis, ne pligrandiĝu per la pezo de la malgajno.

Aviso importante

El año termina y todavía no hemos recibido el importe de algunas suscripciones de éste y aun del próximo pasado, por lo que en adelante no podremos admitirlas sin que antes se nos haya satisfecho su valor, y atentamente suplicamos á los abonados y mediadores que están en descubierto el saldo de sus deudas, recordándoles, como á todos los que en lo sucesivo tengan que hacernos algún pago, la facilidad que damos admitiendo sellos de correos de todos los países.

A los esperantistas españoles que, sin ser suscriptores á nuestro periódico, desean su continuación, les rogamos, como mejor medio de lograr su deseo y el nuestro, que contribuyan suscribiéndose, para que la inmensa carga que hemos aceptado, sin beneficios, no continúe aumentándose con el peso de las pérdidas.

Korespondada fakto de "La Suno Hispana,,

SINJOROJ:

- D. ro S., Nantes (Francujo). Mi ricevis el vi unu frankon. Dankon.
 J. M., Sion (Svisujo). Mi ricevis plie la koston de via abono, o'30 fr. por la prova numero. Dankon.
 J. M. de U., Madrid. Mi sendis al vi alian 23^{an} numeron al via nova adreso, kie mi daŭrigos la sendojn
 P. B., Ceret (Francujo). Mi ricevis numerojn 1^{an}, 2^{an} kaj 3^{an} de E. (dankon) kaj sendis al vi la tri ekzemplerojn de L. S. H. kiujn vi petis al mi.
 R. B., St. Claude (Francujo). Plezure mi yidis viajn literojn. Mi plenumis vian deziron pri L. S. H.
 A. B., Clermont-Ferrand (Francujo). Mi ricevis el vi unu frankon.
 J. M., Sion (Svisujo).—J. K., Palafrugell.—R. A., Palafrugell.—P. R., Tarrasa.—
 J. F. T., Brookline (Amerika U. S.)
 Mi ricevis viajn abonpagojn. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. J. L.

NIAJ VIZITANTOJ

- N.º 12, 1904, kaj 13, 1905.—**Internacia Scienca Revuo.** 27, boulevard Arago *Parizo*, (Francujo). Jarabono; 7 fr.
 N.º 21, 1905.—**Espero Katolika.** A Sainte Raðegonde prs *Tours* (*Indre et-Loire*, Francujo). Jarabono, 2,50 fr.
 N.º 25 kaj 26, 1905.—**The Esperantist.** 67, Kenington Gardens Square, W., *London* Jarabono, 4 fr.
 N.º 11 kaj 12, 1905.—**The British Esperantist.** 13, Arundel street, Strand, W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 frankoj.
 N.º 26.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima* (*Peruo*). Jarabono, 3 frankoj.
 N.º 2 kaj 3, III jaro, 1905.—**Juna Esperantisto.** 9, avenue des Vollandes, *Genevo* (Svisujo). Jarabono, 2 fr.
 N.º 130, 131 kaj 132, 1905.—**Museo Exposición.** Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.
 Jul.-Aŭg. 1905.—**La Meksika Lumturo.** *Sta. Rosa, Necoxtla, Veracruz* (*Meksikujo*). Jarabono, 3 fr.
 N.º 6, 7, 8 kaj 9, 1905.—**Svisa Espero.** 6, vieux College, *Geneve* (Svisujo). Jarabono, 2,50 frankoj.
 N.º 12, 2.^a jaro, 1905.—**Germana Esperantisto.** Prinzentrasse, 95, *Berlin S.* (*Germanujo*). Jarabono 3 markoj.
 N.º 14.—**La Alĝera Stelo.** 57, rue d'Isly, *Alĝer* (*Alĝerujo*). Jarabono, 3 fr.
 N.º 103.—**Revista del Ateneo Obrero Manresano.** Borne, 13, Manresa. Senpage al la protektantoj. Unu numero, 0,10 pesetoj.
 N.º 79, 82 kaj 84.—**La Revue de l'Esperanto en Le Cicerone.** 102, rue de la Paix, *Boulogne sur-mer* (Francujo). Jarabono, 10 fr.
 N.º 129.—**Lingvo Internacia.** 33, rue Lacedde. *Paris*. Jarabono, 5 frankoj. Kun literatura aldono 7 fr. 50.
 N.º 3, 4 kaj 5.—**Ruslanda Esperantisto.** S. Petersburgo, Bolš. Podjaeskaja, 24. *Rusujo*. unu numero 30 kopekojn.
 N.º 4.—**Gefrataro Esperanta.** Napolo, Largo Gesu e Mario, n.º 4. *Italujo*. Jarabono, 4 fr.

N.º 11.—**Esperanto**. Ceret, 4. Pir. Or. *Francujo*. 24 numeroj sinsekvaj, 3 fr.
N.º 38.—**La Belga Sonorilo**. S-ro J. Coox, Duffel, *Belgujo*. Jarabono, 4 fr.
N. 3, II jaro.—**Holanda Pioniro**. *Hilversum, Holando*. Jarabono, 3 fr.
N.º 4 kaj 5.—**Tra la Mondo**. 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon* (S. et O. *Francujo*) Jarabono, 8 fr.
N.ºj 1, 2, 3 kaj 4.—**Esperanto**. *Falta (Rusujo)*. Jarabono, 8 fr.

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

S-ro E. B. Pye-Smith, esperantisto n.º 12.333—Willersley—Croydon—Anglujo.
Deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn.

S-ro A. Bony, libristo, 5, rue Saint-Genés, en Clermont-Ferrand (France) deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj kun hispanaj esperantistoj.

LEGU, ABONU LA PROPAGANDAN GAZETON

★ ESPERANTO ★

La plej granda, la plej ofta, la plej rapide informata
— el ĉiuj esperantistaj gazetoj —

EN LINGVOJ ESPERANTO KAJ FRANCA REDAKTATA

aperas 2, 3 aŭ 4 fojoj ĉiumonate

ABONKOSTO 4 PESETOJ JARE

— — —
SIN TURNI AL

Esperanto. 4. Céret. P. O. France

L' Esperantiste oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da teksto franca-
esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage,
3 fr. 50 por unu jaro. 4 fr. kun enskribo en la societon. Turnu vin al *Administration de «L'Esperantiste», Louviers (Eure) France*.

Ni translokis la Administracion de nia gazeto kaj ni petas, oni adresu la korespondadojn, abonojn kaj ĉiujn aferojn, al sinjoro Administranto de «La Suno Hispana»—Avellanas, 11, presejo—Valencia (España).

Hemos trasladado la Administración de nuestro periódico y rogamos que se dirija la correspondencia, abonos y todos los asuntos, al señor Administrador de «La Suno Hispana»—Avellanas, 11, imprenta—Valencia (España).